



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 214

Februaro 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## MANK'

Iam mi amikiĝis kun interesa vir', versist', Esperantist'. Lin multe interesis la eblec' en Esperant' ne trakti pri la lasta liter' en literar', se temas pri kutima substantiva finaĵ'.

„Kia kreem' estiĝas el tiu manier' de verkad'!” li ekkriis al mi kiam ni babilis dum vespera kunven'. „Versart' multe pli beliĝas, faciliĝas per ĝi.”

Mia amik', versist', tiam legis min al lia jena versar': „Venu, virin', al mia brak' / Kiel plaĉa estas via atak'”. Mi kapjesis al lia sperta uz' de elizi'. „Kaj jen alia,” li diris. „Kara bela virin'! / Mi ege amas vin.” Kiel antaŭe, mi aplaŭdis lin.

Nun li ridetis. „Jen eĉ pli ŝatinda,” li diris dum li puŝis ĝin miadirekte. „Virin', mi ŝuldas al vi dank'n / ĉar vi tre bele kuiras kuk'n.” Lia mien' griziĝis kiam mi eksplikis al li pri la erar'. „Sed ĉu mi rajtas ne skribi la pezan finaĵ'n en substantiv'? Ja vi scias, pri ki' temas.” Pacience, mi klarigis al li ke tia uzad' estas mal-Fundamenta. Li grumblis pri tiu katen' kaj malfeliĉe eliris el la klubej'.

Pasis semajn' ĝis la sekva kluba kunven'. Li venis kun fask' da paper'. Pezpaŝe, li aliris min kaj diris, „Jen mi verkis alian pr'v'n. Legu!” Mi legis: „Virin', mia k'r' plene je d'l'r' / Neniam plu malfermiĝ's al via am'r'.”

Leginte mia verda intern' velkiĝis. Mia vizaĝ' paliĝis, kaj mi laŭte kriis al apuda samidean', „Trenu lin el nia ej'! Ŝajne li ne plu interesiĝas pri la vera lingv'!” La versist' ne atendis ĝis la samidean' lin kaptis, sed tuj marŝis eksteren, sakrante.

Baldaŭ leter' de li aperis en mia leterkest':

Pr' l' 'k'z'j' 'n l' kl'b' d'm' m' n' pl' p'r'l's. V" k'nd't' ŝ'jn's 'l m' t't' 'ĉ' k'j k'ntr'ŭ l' sp'r't' d' n" k'r' l'ngv'. M' 'sp'r's, k' n' n'n"m d'n'v' r'nk'nt'ĝ's. K'j s' m' i'm v'd's v'n s'r l' str't', m' n'pr' 'k'r's 'l'd'r'kt'n.

S'nc'r' v", KP.

Tuj mi ĵetis ĝin rubujen. Pri versart' mi decidis rezigni. Estas nur ĝen'.

— Tim WESTOVER (Davidsono, NC, Usono) el "La NASKa Fasko" (Volumo 15-Numero 11, Brattleboro, Vermonto, 2003 Julio 21), redaktas Tim Westover. Vidu la retpaĝon:

<<http://www.medialabinc.net/temp/fasko/nask2003/index.asp>>

## JARFINAJ TAGOJ EN LITOVIO

En la lastaj tagoj de decembro 2003-a turistoj nemultnombris en Vilnius, la ĉefurbo de Litovio. Dum vespermanĝo en kela restoracio ĉe la hotelo Neringa, Gedimino 23, kelnero ĵetis al mi demandon: „Kiucele vi venis al la lando?” Ekestis interesa anglalingva interparolo, dum kiu mi klarigis al li ion pri Esperanto ĝenerale kaj pri la Universala Kongreso en 2005. Ni ambaŭ ridetis kaj ĝojis. Kiam mi estis foriranta la vilniusano rimarkigis: „Ne forgesu, ke Esperanto naskiĝis en Litovio!” Post du tagoj mi denove vizitis la saman lokon kaj ricevis gajajn revidajn salutojn. Tuj oni trovis por mi liberan lokon inter multnombraj enlandaj klientoj. Bedaŭrinde mi forgesis mendi glason da akvo. Subite mi decidis utiligi la libron *Litovaj-Esperantaj Konversacioj* de Stasys Gaidamavicius. Tuj la kelnero ekregis la situacion. Li vokis ankaŭ aliajn ĉeestantojn aplaŭdi pro mia ĝentila gesto uzi la lokan lingvon – pri kiu mi scipovis nur unu solan frazeton. Unika sperto en mia ĝisnuna vivo. Tiaj etaj aferoj estis bela uverturo por mia unua vizito en Litovio. „Litvo! Patrujo mia! simila al sano...” tiuj ĉi tre kortuŝe pentritaj vortoj el la plumo de litov-

devena poeto Adomas Mickevicius (1798-1855) forte ekvivis en mi. La unusemajna aventuro sukcese komenciĝis.

Laŭ miaj spertoj Litovio ne estas tre konata de finnoj, sed mia interesiĝo jam vekiĝis. Vere dankema mi estas al Irena Alijosiute, kiu sperte enkondukis min en la urban labirinton ĉe la rivero Neris. Tro forte oni ne povas substreki ŝian celtrafan kaj helpeman agadon, kiu faciligis miajn strebadojn kaj, mal-longe dirite, estis neanstataŭigebla. Bonege Irena jam nun konstruas la formikejon, kiu havas la nomon *La 90-a Universala Kongreso de Esperanto*. El ŝia oficejo ĉe la Operejo de Vilnius disradias multaj ligiloj, kiuj ankaŭ al mi montriĝis praktikaj kaj utilaj.

Kompreneble mi scias, ke la ŝarĝo ne kuŝas nur sur ŝiaj ŝultroj; estas ja krome multaj aliaj, kiuj pluportas la torĉon eklumigitan en la jaro 1887 en Varsovio. Venontaj kongresanoj estas jam nun kaj estos antaŭ ĉio dum la somero de 2005 en kapablaj kaj fid-indaj manoj.

Ne estas eble ĉi tie preterlasi mencion pri eldonaĵoj, kiuj helpas esperantistojn vojaĝontaj al la jubilea kongreso en la naskiĝlando de Klara Zilbernik.

Luksaj estas turismaj broŝuroj, kiujn litovanoj distribuis dum la 88-a UK en Gotenburgo. Specialan atenton meritas du etformataj poŝlibroj, kiel oni kutime diras, nome *Litovaj-Esperantaj*

*Konversacioj* kaj *Esperanto Raktas*, la lastemenciita estas lingva ŝlosilo.

Ambaŭ titoloj estas ĉefe celitaj por litovanoj, sed ili taŭgas kaj estas utilaj ankaŭ por eksterlandanoj. Sincere mi rekomendas havigon de ili jam sufiĉe frue antaŭ la vizito kondukota sur la paŝojn de grandduko Gediminas (regadis 1316-1341) en la urbo Trakai kaj en Vilno, kiun li faris ĉefurbo en 1323. Sur la kovrila paĝo de la verko *Litovio dum jarcentoj* de Petras Celiauskas estas skribite i.a. jene: „Iru via infanaro nur laŭ virta vojo. Ĝi laboru por bonfarto kaj por homa ĝojo.”

Temas pri fragmenteto el la ŝtata himno de la lando. Por pli bone kompreni la hodiaŭon, necesas legi ankaŭ pri la pasinteco. La aŭtoro sukcesis lerte skizi multfacetan mozaikon pri historiaj kaj nuntempaj okazintaĵoj. Indas jam anticipe mendi la verkon ekzemple pere de la libro-servo de UEA, ĉar tiel oni povas trankvile jam hejme antaŭ la forveturo ĝui pri flua stilo, kiu karesos okulojn ankaŭ de komencantoj. Sinceran gratulon meritas la kompilinto, s-ro Celiauskas, kiu krome redaktas la prestiĝan revuon *Litova Stelo*.

Etaj problemoj ekestis dum la vizito pro ĉefurbaj trafiklinioj. La kajereto,

kies nomo estas *Exploring Vilnius* havas tre detalan mapon pri urba publika trafiko. Tamen sur la skema desegnaĵo estas tiom malgrandaj ciferoj, ke eĉ forta lupeo ne ĉiam helpas. Espereble somere 2005 kongresanoj povos ricevi iom pli simpligitan kaj grandigitan planon de aŭtobusaj linioj kaj haltejoj kun nomoj en trafikiloj laŭtparolile anoncataj. Diversajn embarasojn eksterlandanoj facile solvas, ĉar enlandanoj volonte helpas fremdulojn. Pri tio mi ricevis multajn belajn ekzemplojn. Se ekestis lingva barilo, homoj komencis helpi uzante gestojn, mienojn aŭ fingrojn. Dektaga bileto por urbaj trafikiloj estas aĉetebla ekzemple ĉe la gazetkiosko staranta apud la fervoja stacidomo. Ĝi kostas 20 lidojn.

La spaco ne permesas raporti pri ĉio interesa. Laŭ mi, Vilnius meritas informan rondveturon aŭtune de 2004 el Finnlando. Tiucele jam komenciĝis miaj preparoj post la decembra vojaĝo. La unua invito koncerne informojn pri la kongresurbo en la jaro 2005 alvenis tuj kaj senhezite el la finnaj urboj Jyväskylä kaj Tampere. Tute simple mi pensas, ke jen estas mia tasko por subteni gravan kaj signifan agadon de litovanoj. En Vilnius, novan freŝan entuziasmon al mi donacis lokaj aktivaj geagemuloj – Valdas Banaitis, Laurynas Skupas, Choe Taesok, Vida Cojiene, Irena Alijosiute – kaj krome multaj nekonataj, afablaj kaj helpemaj litovanoj surstrate kaj aliloke renkontitaj. Koran dankon al ĉiuj - kaj ĝis la revido somere en 2005!

— Jorma Ahomäki  
(Turku, Finnlando)

## SUPERJARO

La jaro 2004 estas superjaro, tio estas, la monato februaro enhavas plusan tagon, 29 tagojn anstataŭ la kutimaj 28. Kial?

Ordigemaj homoj ŝatas la ideon, ke la sama monato devus esti en la sama sezono, jaron post jaro, eĉ post centoj aŭ miloj da jaroj. Se la printempo komenciĝas proksimume je la 21a tago de marto, ni devas ne permesi marton vagi tra la sezonoj, nun la plej malvarma monato kaj post kelkmil jaroj la plej varma. Ni deziras stabilecon. La bezono por stabileco pligrandiĝis pro la decido de la Kristana eklezio, ke Pasko, tre grava religia festo, devas proksime sekvi, laŭ formulo, la komencon de la printempo.

Ni demandu nin, kio estas jaro? Por niaj ĉiutagaj celoj, jaro estas la tempo de unu printempa ekvinokso ĝis la sekvanta. Ekvinokso estas tiu momento kiam la ĉielekvatoro renkontas la ekliptikon, kiel okazas dufoje ĉiujare, unufoje kiam la ĉielekvatoro vojaĝas suden kaj duafoje dum la vojaĝo de la ĉielekvatoro norden.

Tamen, ho ve! La nombro da tagoj inter du printempaj ekvinoksoj ne estas 365, nek 366. Laŭ nia difino de jaro, la nombro da tagoj en unu jaro estas proksimume 365.24219. Maloportuna nombro, sed tre proksima al  $365\frac{1}{4}$ , ĉu ne? Pro tio, de 46 a.K. ĝis 1582 ni uzis la julian kalendaron en kiu estas superjaro je ĉiu kvara jaro.

Tamen restis eta eraro en la julia kalendaro, kaj tion oni preskaŭ korektas per la „moderna” gregoria kalendaro, en kiu ĉiu kvara jaro estas superjaro, krom kiam la jarnumero estas dividebla per 100; tamen, se ankaŭ la jarnumero estas dividebla per 400, ja estas superjaro. Nur pro ĉi-lastaj estis 2000 superjaro.

Do, memoru: ĉiu kvara jaro estas superjaro, sed 2100, 2200 kaj 2300 ne estos superjaroj. Tamen 2400 estos superjaro. Ne forgesu!

— Steĉjo

**Studu Esperanton, vivu en Esperantujo ĉi somere, 5a - 23a de julio, ĉe la Nord-Amerika Somera Esperanto-Instituto ĉe la Lernejo por Internacia Trejnado en Brattleboro, Vermont. Instruistoj: Duncan Charters (Usono), Katalin (Smideliusz) Kovats (Hungario) kaj Lee Miller (Usono). Vi povos elekti vian kurson el tri eblaj niveloj.**

**Kotizo por la kurso: \$980 (usonaj). Ĉambro (kun ĉambrokunulo) kaj tri manĝoj ĉiutage dum la tri semajnoj: \$700 (usonaj). Stipendioj haveblaj: Kontaktu Ellen M. Eddy ĉe 1736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USA, tel: 360-754-4563 aŭ: eddyellen@aol.com**

**Enskribiĝu perrete: <http://www.sit.edu/esperanto/index.html>**